

## Kultura vivo en Romandio

Claude Gacond, 73-a radioprelego, 1964.04.22 & 25

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la kultura vivo en Romandio. Vi aŭdas Claude Gacond.

« Plejmulto el la homoj, anstataŭ loĝi ĉe si, vivas ĉe aliulo, ili estas kiel luprenantoj en siaj opinioj kaj en sia moralo » skribis Alexandre Vinet, unu el la teologoj, edukistoj kaj verkistoj, kiu plej multe influis la kulturen vivon en Romandio dum la pasinta jarcento.

« Tiu malfortulo, tiu skrupulemo, tiu turmentigito markis sian landon kaj sian epokon per tiom forta kaj daŭra spuro, ke en la fino de la 19-a jarcento ne estas kalkuleblaj la omaĝoj de tiuj, kiuj vidas en li penso- kaj vivo-kondukanton » skribas pri Alexandre Vinet Alfred Berchtold en sia libro pri Romandio. Ni ĉerpos hodiaŭ el tiu verko *La Suisse romande au cap du 20<sup>ème</sup> siècle* sciigojn pri la vivo kaj penso de Alexandre Vinet. Ili helpas vin eble kompreni iomete pli bone la originalecon de tiu protestanta landeto Romandio, kiu tiom influis la francan civilizon depost la Reformacio.

Por Alexandre Vinet « La protestantismo (mi citas lin), en politiko, en religio, en literaturo, estas la rajto sin izoli de la kredaro, por vidi se oni povos sin religi al ĝi kaj ĝis kia grado. Ĝi estas tiu rajto apartigi sian intelektan riĉecon de la nedividebla riĉeco kaj de la publikaj kredoj, por ĝin reekzameni kaj poste revarbiĝi, sed kun kaŭza kono, en la socion. »

Por Alexandre Vinet kio plej gravas, tio estas la sincereco. Li volas nin senkompromise fidelaj al la vero, kiun ni malkovris. Tiu vero superas ĉiam la sektemajn spiritojn, kiuj ĝin kripligas aŭ kiuj agnoskas al ĝi nur poluson. La vero emas enkarniĝi en konkretajn kondiĉojn. Ĉiam havi antaŭ la okuloj la homaron de sia tempo, desupri – se tio vere estas desupri ! – el la sfero de pura spiriteco en tiun de la realeco kaj de la nuno, tio estas reproximiĝi al la evangelio.

Pro konsciiĝo de sia misio la timema Alexandre Vinet aŭdacos alfronti la potenculojn. Li fariĝos unu el la plej maltimaj polemikistoj de nia lando.

Troa modesteco malhelpis tiun literaturan profesoron respondi al insistaj alvokoj venintaj el Parizo kaj Montauban. Dudek jarojn li restadis en Bazelo okupita al laboro ŝajne subalterna. Tamen, kiam li anoncis kurson pri literaturo, li estis devigata ĝin prezenti en preĝejo, tiom granda estis la aŭdantaro, kiu eĉ venis el la najbara urbo Mulhouse.

Alexandre Vinet atente sekvas la politikan vivon de sia kantono Vaŭdo. Lin indignigas la netoleremo de la registaraj instancoj rilate al liberaj religiaj eklezioj. Broŝuron *Pri la respekto de la opinio (Du respect des opinions)* li eldonas por demonstri, ke se sur la religia tereno la sincereco estas devo, la rezulto estas, ke la libereco estas rajto. Baldaŭ la juna teologo estas kondukata al aliaj konsekvencoj. En *Memuaro pri la libereco de la kultoj (Mémoire sur la liberté des cultes)* li asertas, ke la libereco de la konsciencoj implicas la liberecon de la kultoj, kiu estos perfekte plenumita nur per la separado de la Eklezio el la Ŝtato.

Multaj tiamaj asertoj de Alexandre Vinet famiĝis en nia lando. Ilin ripetas la civitanoj dum la ideoj kaj sociaj debatoj. Per ili la svisoj estas influataj al komprenemo de alies vidpunktoj. Mi citos kelkajn el tiuj famaj kaj kuraĝaj asertoj de Vinet :

« Malmorala leĝo, senreligia leĝo, leĝo kiu devigas min fari tion, kion mia konscienco kaj la leĝo de Dio kondamnas, se oni ĝin ne povas nuligi, tiam oni devas ĝin spiti. Tiu principo, kiu tre foras subversion, estas la principo de la vivo en societoj... Ribelo post ribelo perfektigas la societojn, stariĝas civilizo, regas justeco kaj floras Libereco. »

« Voli malebligi, ke ideo alvenu ĉe popolo kaj tie incitu la spiritojn, estas tiel sensenca, kiel voli reteni ventojn ĉe landlimo aŭ voli submeti birdojn de la aero al dogana pago. »

## Kultura vivo en Romandio

Claude Gacond, 73-a radioprelego, 1964.04.22 & 25

Pro tiu polemikemo Alexandre Vinet iom post iom konos financajn kaj profesiajn malagrablaĵojn. Li estas eksigita de siaj pastoraĵ funkcioj. Li tamen daŭrigas la lukton : « Konscienco, li diras, troviĝas super la leĝoj. » Li sciis, ekbatalante, kien riskas lin konduki la polemikado, ke la libereco ne estas sen danĝera vojo. Li estis skribinta : « Kiam ĉiuj riskoj troviĝus en la libereco kaj plena trankvileco en la servado, mi preferus ankoraŭ la liberecon : ĉar libereco estas vivo kaj servado morto.

Por Alexandre Vinet esti protestanto signifas senĉese protesti kontraŭ la devigoj sur la religia tereno.

Se Alexandre Vinet estas konata kiel polemikisto, li ankaŭ estas konata kiel granda edukisto, kiu anoncas la famajn Claparède kaj Adolphe Ferrière. Aŭskultu unu el liaj asertoj : « Studu, se vi havas la okazon tion fari, infano direktata kaj ne neniigata de tiu granda mortiga sistemo, kiun ni emas nomi edukado. Vi vidos, eĉ en la malplej rimarkeblaj uloj, la intencon de la Providenco fari, de ĉiu estulo, estulon diferecan de ĉiuj aliaj. »

Vinet ankaŭ insistis pri la esenca rolo de la virinoj en la socia vivo : « La monda irado ŝajne forgesas la virinon ; sed, nevidata kaj silenta, ŝi regas tiun mondon, kie ŝia rolo ŝajnas tiel suba. » Vinet batalis por la supera instruado de la knabinoj. Li troviĝis inter la fondintoj de lernejo en Lausanne, kiu hodiaŭ ricevis lian nomon.

Ekster nia landeto Alexandre Vinet estas ĉefe konata kiel beletra kritikisto, kies artikoloj kaj korespondado fariĝis por la literaturistoj riĉa fonto de klarvidaj kaj interesaj konstatoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la kultura vivo en Romandio.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-